

## Muzeo kie oni ludas : Malgranda muzeo pri Jean-François Oberlin

La trilingva muzeo Oberlin, ([www.musee-oberlin.com](http://www.musee-oberlin.com)) ebligas ludante malkovri la pedagogion de la pastoro Jean Frédéric Oberlin de Waldersbach, kiu edukis montaranojn en la 18-a jarcento.

Malfermite de la 14a ĝis la 18a.  
Tarifoj de la muzeo :  
Plenkreskulo po 4 €, rabata tarifo po 3,00 € (malpli ol 18 jaroj, studentoj ĝis 25 jaroj, familie po 10 € (unu aŭ du plenkreskuloj kun siaj infanoj)

Tél. : 03 88 97 30 27  
Fax : 03 88 97 32 21

Ĉiuj skribaĵoj kaj ludoj aperas france, germane kaj angle. Ĉiĉerona vizito en la franca, germana aŭ angla okope aŭ pli multnombraj, po 1,50 € kape.

Iru direkten al Schirmeck, en la vilaĝo Fouday, turnu dekstren al « Champ du Feu ».

La muzeo estas en la malgranda vilaĝo Belmont, 25 montée Oberlin proksima al la stacidomo.



La muzeo instigas vin pripensi al daŭrigan evoluadon kaj naturan medion, asociante evoluado kaj homaj rajtoj.

Vizito en Esperanto pro la okazo se estas sufiĉe da partoprenantoj.



Saâles →

# 62-a Regiona Staĝo de **esperanto**

**Programlibreto**

# Bonvenon !

*Esperanto*  
**2007 :  
100 ans**  
*Strasbourg*

## Saâles, Alzaco 19-21 oktobro 2007



**esperanto**  
France-Est



# BONVENA MESAĜO

## 62 regiona staĝo de Esperanto

### Saâles, Alzaco, 19-21 de oktobro 2007

Toute l'équipe organisatrice est heureuse de vous accueillir dans cette belle région vosgienne. Région typique. Imaginez que notre kongresejo est située précisément sur la limite départementale entre le Bas-Rhin et les Vosges, donc entre l'Alsace et la Lorraine. Et il y a quelques décennies, il s'agissait là d'une vraie frontière entre l'Allemagne et la France. Vous prendrez d'ailleurs le café en Alsace et déjeunerez en Lorraine...

Nous espérons que le programme proposé vous séduira et que nous aurons, ensemble, des moments de convivialité que l'espéranto nous offre si souvent, sans frontières !

Bonvenon en Saales, karaj geamikoj !

La tuta strasburga teamo sincere ĝojas akcepti vin en tiu belega vojeza regiono. Tipa regiono ĉar ĝi situas precize sur la limo de la departamentoj Bas Rhin kaj Vosges, do konsekvence sur la limo de la alzaca kaj lorena regionoj. Ni ne forgesu ke tiu limo estis antaŭ ne tro longe vera landlimo inter Germanio kaj Francio. Kiam vi trinkas kafon en la akceptejo, vi situas en Alzaco kaj kiam vi manĝas en la restoracio vi trapasis regionan limon...

Ni esperas ke la proponata programo plaĉos al vi kaj ke ni ĉiuj, kune, havos plej belajn travivaĵojn en senlandlima Esperantujo...

Gilbert Stambach,  
Prezidanto de Esperanto Orienta Francio

Por la dimanĉa posttagmezo, la strasburga klubo proponas plurajn eblecojn :

### Memormuzeo de Alzaco-Loreno en Schirmeck

Kial tia memormuzeo ? Centra en Eŭropo, Alzaco-Loreno ŝanĝis sian nacion kvarfoje inter 1871 kaj 1945 dum sia tragika fato. Tiu memormuzeo rakontas la historion de Alzaco kaj Mozelo inter 1870 ĝis hodiaŭ.

Por senti la etoson dum la 1939a evakuado, malkovri vivon en Maginot fortikaĵo, senti premon de la naziigo, pripensi perfortan enregimentigon de Francoj al la Germana armeo, deportitojn, sendeprenan militon, franca-germanan repaciigon kaj eŭropan konstruadon, ne maltrafu la Alzacan-Mozelan memormuzeon.

La interaktiva historia vojiro daŭras 2 horojn helpata de senpaga aŭskultilo en la franca, germana kaj la angla lingvoj. Malfermite de la 10a ĝis la 18a.

Unuope :  
Plenkreskuloj : po 10 €  
Rabata tarifo : po 7 €  
Rabat tarifo : po 6 €


Familia tarifo : po 20 €

Multope : Grupo de kope aŭ pli : po 7 €  
kape

Kien iri : Vidu mapon ĉe la antaŭa paĝo.

### Sorobano : Japaneca kalkulilo

Sorobano estas origine kalkulilo tradicie longtempe uzata ĝis la apero de komputilo. Ĉeestantoj lernos la unuan paŝon de la sorobaneca kalkulado kun Kimie Markarian uzante paperon kaj krajonon.



## Kultura vespero :

Ce la protestanta preĝejo

- unuaparte Laurence Brochard kaj siaj kunludantoj ludos tradician muzikon.
- duaparte, « Duoblo unu » enkondukos nin tra la mondo per multlingvaj kantoj.

Vidu ĝeneralan mapon por trovi la koncertejon.




Kien iri por vizito de la memormuzeo :



Lokoj en la vilaĝo



Aliaj lokoj : ĝenerala mapo :



## Libroservo

Unu el la plej ampleksaj libroservoj en Francio.

Esperanto-Orienta-Francio proponas foliumi multe da libroj surloke, muziko kaj filmoj, ĉu por infanoj, ĉu por plenkreskuloj.

Por maloftaj aŭ specifaj mendoj, rilatu al  
LIBRO-SERVO 37 rue Pierre et Marie Curie - Fr- 54500  
Vandoeuvre

Retadreso : libroservo.efe@wanadoo.fr

Pago eblas per poŝtgiro al LIBRO-SERVO CCP 2800-76 H Nancy,  
ĉeko aŭ peranto de via lando. Eksterlandanoj prefereble pagu per  
moneroj surloke.

## Kinejo

Per projekciilo, ĝuu filmojn en Esperanto aŭ kun subtekstoj.

Vendrede vespere, vi povos  
elekti kiun filmon vi volas  
spekti.

Sabate, ni proponas la novan  
filmon de Imagufilmo : La  
Patro.


Kiel subtekstigitajn filmojn ni  
havas :

- La Hispana Gastejo  
(L'auberge espagnole)

Por la infanoj :

- Mazi en Gondolando : Fama  
rekta metodo el Britio,  
adaptita al Esperanto en  
Pollando

- Kiriku kaj la sorĉistino  
(Subtekstoj)



**Inaŭguro de la ekspozicio** : Pro la centjariĝo de la Strasburga klubo, malkovru klubon kiu naskiĝis germana kaj fariĝis nur poste franca, sed ĉiam internacia. Historio legebla ĉe la hejmpaĝo [www.esperanto-strasbourg.net](http://www.esperanto-strasbourg.net).

## Frandaĵo de lokaj produktoj :

Dank'al niaj subtenantoj

- Dominique Ganter, en Fréland, produktas mielon
- Fabriko Fortwenger, produktas mielkukojn en Gertwiller
- La urbestro Jean Vogel, produktas konfitajojn en Saâles



## Konferenco pri vozeaj lingvoj :

Sinjorino Fischer proponas al ni prelegon pri tiuj nekonataj lingvoj kiujn nuntempe nur scipovas paroli kelkaj maljunuloj. Temas pri franc-devena arkaikaj lingvoj kiu ne same evoluis kiel la franca.

## Bunta programo :

Samtempe okazas 3 vizitoj sabate posttagmeze :

- Vizitu malgrandan bierfarejon  
(Interpretado fare de Cyrille Hurstel)

De kelkaj jaroj, Jean-Pierre Sauter produktas 500 hektolitrojn da biero jare.

• Vizitu fruktan padon (Interpretado fare de iu)  
Malkovru 300 arbojn el 90 malnovaj fruktaj specoj per unu aŭ du hora promenado en Saâles kaj la ĉirkaŭaĵoj. Vi havos mirindan scenejon super la blua vozeza linio, kiu estis limo inter Francio kaj la dua Germana Imperio. Rendevuo ĉe la urbodomo.

- Vizitu la menonitan gastejon (Interpretado fare de Gilbert Stammbach)

En Bourg Bruche, tute proksime de Saales, ni vizitos, per propraj aŭtoj, la menonitan gastejon, en belega vozeza ĉirkaŭaĵo. Dumgustumado de tortoj, kaj kafumado, ni ricevos klarigojn pri tiu ne vaste konata religio kiu kunigas ne pli ol 2000 membroj en Francio.

***ENSKRIBIĜU  
por la bunta  
programo  
ĉe la akceptejo***

Dimanĉo matene :

Vizitu la kastelon « Haut-Koenigsbourg »


**ENSKRIBIĜU**  
*ĉe la akceptejoj*



Ĉiĉeronado fare de Cyrille Hurstel.

Kiel iri : Ni karavane veturos per propraj aŭtoj ĝis la kastelo. Sekvu tiun ĉi mapo por atingi la parkejon proksima al la kastelo.

Preparu monon por faciligi nian pagon per grupbileto.  
Tarifoj  
Unuope : 7,50 euroj  
Grupe (Pli ol 20 ) : 5,70 euroj



# PROGRAMO

Vidu la ĝeneralan tabulan programon sekvonpaĝe

## Luda vespero

Vendrede 20 :30

La strasburga klubo proponas sian cerb-aktivigan ludon : vortserĉado. Teame trovu vortojn kiuj komenciĝas per la lotitaj literoj.

## Kursoj :

Kurso A : Por komencantoj  
Samia Harir de la Tuluza kultura centro kaj Laurence Brochard de la klubo de Strasburgo entuziasme gvidos vin.

*Por la kursoj*  
**ENSKRIBIĜU**  
*ĉe la akceptejoj*

Kurso B : Por progresantoj  
Violette Walther proponas tralude progresigi kaj kreskigi vian vortprovizon

## Kurso C : Prelegoj

Sabate matene :

Cyrille Hurstel prezentas konferecon pri kasteloj kaj ties fakaj vortoj, problemoj kaj solvoj, ilustrita per pecoj da filmo en Esperanto. Vi malkovros mezepokajn armilojn kaj ĉiujn vortojn bezonataj por viziti la kastelon « Haut-Koenigsbourg ».

Sabate posttagmeze :

Bruno Flochon malkovrigos al vi la lignajhejtigilon de la urbo (Proksima al la preĝejo) kadre de konfereco pri renovigeblaj energioj en Alzaco.

Vidu mapon por la preciza loko.

## Programo de la renkontigo

Vendredo 19a de Oktobro		Sabato 20a de Oktobro				Dimanĉo la 21a de Oktobro					
<b>8h00</b> 8h30		Matenmangho				Akceptejo	Matenmangho				<b>8h00</b> 8h30
<b>9h00</b> 9h30		kurso A : Samia Harir Laurence Brochard	kurso B : Violette Walther	kurso C : Prelego pri Kasteloj Cyrille Hurstel	Akceptejo	Kurso A : Samia Harir	Kurso B : Violette Walther	Kurso C : Ekskurso al kastelo Cyrille Hurstel	Kinejo por infanoj	Akceptejo	<b>9h00</b> 9h30
<b>10h00</b> 10h30		Inauguro de la ekspozicio 100 jaroj+Vizito ubestro				Libroservo	Tagmangho 100a kuko por la 100 jaroj de la klubo				<b>10h00</b> 10h30
<b>11h00</b> 11h30		Tagmangho				Libroservo	Tagmangho 100a kuko por la 100 jaroj de la klubo				<b>11h00</b> 11h30
<b>12h00</b> 12h30		Kurso A : Samia Harir	kurso B : Violette Walther	kurso C : Renovigeblaj energioj+Vizito	Libroservo	Ekskurso : Memormuzeo Schirmeck (Trilingva)	Ekskurso : Muzeo pri J.F.Oberlin (Trilingva)	Sorobano	Libroservo	<b>12h00</b> 12h30	
<b>13h00</b> 13h30		Frandajho de loka produktoj				Libroservo	Ekskurso : Memormuzeo Schirmeck (Trilingva)				<b>13h00</b> 13h30
<b>14h00</b> 14h30		Konferenco pri vogeza lingvoj				Libroservo	Ekskurso : Muzeo pri J.F.Oberlin (Trilingva)				<b>14h00</b> 14h30
<b>15h00</b> 15h30		Konferenco pri vogeza lingvoj				Libroservo	Ekskurso : Muzeo pri J.F.Oberlin (Trilingva)				<b>15h00</b> 15h30
<b>16h00</b> 16h30		Bunta programo =>	Frukta pado	Vizito de Memonita loko	Libroservo,	Sorobano				<b>16h00</b> 16h30	
<b>17h00</b> 17h30	Akceptejo, knajpo	Bunta programo =>	Frukta pado	Vizito de Memonita loko	Libroservo,	Sorobano				<b>17h00</b> 17h30	
<b>18h00</b> 18h30		Vespermangho				Libroservo,	Sorobano				<b>18h00</b> 18h30
<b>19h00</b> 19h30	Vespermangho	Vespermangho				Libroservo,	Sorobano				<b>19h00</b> 19h30
<b>20h00</b> 20h30	Luda vespero	Koncerto : unua parto : tradicia muziko dua parto : grupo Duobla Unu che la protestanta preghejo				Libroservo,	Sorobano				<b>20h00</b> 20h30
<b>21h00</b> 21h30		Koncerto : unua parto : tradicia muziko dua parto : grupo Duobla Unu che la protestanta preghejo				Libroservo,	Sorobano				<b>21h00</b> 21h30
<b>22h00</b> 22h30	Kinejo : Elektebla	Kinejo : La Patro				Knajpo	Sorobano				<b>22h00</b> 22h30
<b>23h00</b>											<b>23h00</b>